



# MUZIKA ESPERANTO- LIGO

**MUZIKO**

Organo de MEL  
FONDITA EN 1963

1992 / 1

M U Z I K A E S P E R A N T O - L I G O (MEL)

1992/1

ABONPREZO: US\$10 pagita al:UEA konto,kodo-melx-y aŭ  
per via peranto.

REDAKCIO: Milin kamæk 58,1421 Sofia,Bulgario  
redaktoro:Dimitar Terziev

Kunlaborantoj: Kay Andersen,19 Sherley St.,Moorooka  
Q 4105 AŬSTRALIO

Henri Lasserre,32 Res.de Petit Bontemps  
78370 Plaisir, FRANCE

David Gains,POBox 9684nWashington  
DC 20016-9684, USONO

Perantoj:

ARGENTINO:C.Tomas,Mariano Esk-  
alada1378,RA-1684 ElPalomar

AŬSTRALIO:K.Andersen (supre)

AŬSTRIO:G.Cool,Leitringerstr.  
53,A-8430 Leibnitz

BELGIO:H.Wauters,Gentse Ste-  
enweg 108,B-9300 Aalst

BRITIO: R.Walter,28 Iver Lane  
Iver,Bucks. SLO 9LF

BULGARIO:L.Dokova,Vranja 31,  
BG-1233 Sofia

ĈINIO:Ch.Yong Hua,POBox  
2421-3,Beijing 100081

FINNLANDO:A.AliSimola,Friskin-  
katu2 A 33,SF-20350,Turku 35

FRANCIO:L.Marin,9rue Adrien  
Lejeune,F-93170 Bagnolet

HUNGARIO:A.Besenyei,Szerémi  
21 IV 20, 1117 Budapest

IRLANDO:MaireMcKay,The  
Manse,Clonminch,Tulla-  
more,co.Offaly

KUBO:M.Lopez,Apartado  
2018,Habano-2

NEDERLANDO: G.Derks,  
Ootmarsumsestraat 47,  
NL-7607 Ax Almelo

NORVEGIO:S.Birkeli,Kyr-  
kjegata11,N-4200 Sauda

POLLANDO:D.Soska,Space-  
rova6/14,21-020Milejew

RUSLANDO-A.Orlov,p/k78,  
109004 Moskva

SVEDIO:G.Olsson,Gransi-  
kagatan68,S-54140Skövde

SVISLANDO:N.Weiss,Sagi  
str.20,CH-6300 Zug

USONO: (supre)

D A N K - P A Ĝ O

Ĉi-foje ni deziras elkore danki unue al ĉiuj de vi, kiuj sendis leterojn kun varmaj vortoj de kontento pri nia bulteno MUZIKO 91/3.

Unuavice, ni dankas al nia fama Esperanto-poeto kaj verkisto s-ro William Auld (ni publikas lian leteron) kiu, krom letero sendis partiturojn de tri Esperant-kantaĵojn; ankaŭ ni dankas al L. Broekema-Schröner el Nederlando, kiu sendis 13 Esperanto-muzikaĵojn de nederlanda komponisto Fr.Moolenaar, kaj ankaŭ lian kantaton "El la vivo de Zamenhof" (grandformatan kopiraĵon-31/29 cm); al Kay Andersen el Aŭstralio pri "Vocal Success" de R.Foster kaj multaj raportoj; al Gerda Derks el Nederlando pri ŝia financa subteno; al Mireille Grosjean el Svislando pri ŝia interesa artikolo kaj kant-partituro; al A. Ali-Simola pri la sendita muziklernolibro kaj kotiz-pago; al Telesforas Lukoŝeviĉius el Litovio pri la libreto "Sub la Nordlumo" kaj leteroj; al Martin Kastro, Kubo por sonbendo de IEĤoro dum 75 UK.

La spaco ne sufiĉas por ĉiuj dankrajtintoj, sed ankoraŭfoje al ĉiuj - ELKORAN DANKON !

ENHAVO:

- |    |                          |    |                        |
|----|--------------------------|----|------------------------|
| 4  | Komponado-Eduardo Vargas | 15 | Intervuoj-prof.StĜuĝev |
| 6  | Mireille Grosjean-letero | 17 | Raporteraĵoj           |
| 10 | Ĉe la bela, blua Danubo" | 19 | Rok-muziko             |

ESPERANTO-MUZIK K O M P O N A D O
-----------------------------------

EDUARDO VARGAS /SOLO/  
(h i s p a n o)



Por li kaj liaj komponaĵoj oni skribis multfoje en "Rok-Gazet", eldono de Esperanto Rok-Asocio, sed ni ricevis leteron kaj specialan sonbendon kun peto prezenti lin antaŭ nia legantaro. Ni faras tion per la propra letero de s-ro Vargas.

..... Mi ne faras rokon (mi ne estas rokemulo) kvankam mi respektas ĝin... en miaj komponaĵoj oni rimarkas etnaj-ritmojn, pop-skemojn, mediteraneajn melodiojn kaj klasikajn nuancojn.

Mi lernis en konservatorio: solfaon, harmonion, pianon, orkestro-direktadon, ion pri komponado, sed precipe mi aŭskultas multe muzikon-pop, European sonon, etna-muzikon kaj el la klasikuloj: Bach, Liszt, Bartok, Falla, Lutoslawsky, Hindemith kaj el aliaj muzikistoj de nia jarcento...

Mi surbendigis miajn kantojn kaj simfoniojn.... nuntempe mi laboras kantato-oratorion "BABEL-TURO" por Ĥoro, solistoj, orkestro kaj sinteziloj; baldaŭ mi esperas surbendigi ĝin;... mi prezentis mian diskon en Barcelono, Taragono... en aprilo mi koncertos en Bordojo, Montpellier, Toulouse kaj mi intencas koncerti en Vieno dum la UK, en Verono dum EK ktp.....

Do, ni ĝojas kaj bondeziras al Eduardo multajn sukcesojn. Lia adreso: C/. Ayala 3, 29002 MALAGA,

HISPANIO



## Karaj geĥoranoj de Internacia Esperanto-Ĥoro,

Post longtempa malsaniĝo de via ĥorestro, post multaj malfacilaĵoj, ekonomiaj kaj aliaj, finfine en viaj manoj estas MUZIKO 92/1 kun partituro de tiel nomata himno de Vieno - "Ĉe la bela, blua Danubo" - J.Strauss.

Vi povos facile trovi vian voĉ-partion: Soprano supre, Aldo sube je la unua liniaro; Tenoro supre, Baso sube je la dua liniaro de ĉiu paro linearoj.

Konsciante la limigitan tempon kaj amatoran voĉeblecojn, ni elektis nur parton el la tuta komponaĵo, kiuj plej facile taŭgas al la gekantistoj.

En la programo de la Ĥoro ni antaŭvidas ankoraŭ "Kanto de l'Ligo" - W.A.Mozart kaj "Himno de Ĝojo" - L.van Beethoven, kiuj estas bone konataj al pli granda parto de la kantistaro.

Cetere, lernu ĝentile viajn voĉ-partiojn, karaj geĥoranoj, por ke ni povu sukcese prezentiĝi dum la Internacia Vespero de la 77-a Universala Kongreso de Esperanto.

Mireille Grosjean  
CH-2416 Les Brenets  
SVISLANDO

S-rino M.Grosjean sendis al  
ni tre interesan leteron, kiu  
starigas antaŭ ni problemojn,  
ligitajn kun muziko, traduko  
ktp.

Ĉu vi havas tempon? Ĉu dum la venontaj dek aŭ dek-  
kvin minutoj neniu, nenio ĝenos vin? Se jes, sidigu  
komforte kaj legu belan rakonton veran, eble dum aŭ-  
skultado de unu el la ses belegaj suitoj por violon-  
ĉelo de BACH, se vi havas ilin sur disko.

La Chaux-de-Fonds en svisa Ĵuraso estas fama urbo  
en Esperantujo pro Kultura Centro Esperantista. Plie  
okazas en tiu urbo ĉiun duan jaron staĝo muzika, or-  
ganizata de la muziklernejo kaj de la Rotary-klubo.  
La staĝon gvidis inter aliaj la trompetisto Delmotr,  
la pianisto Miguel Angel Estrella, la flutisto Aurèle  
Nicolet. Sed pri la violonĉelisto Paul Tortelier, kiu  
en 1991 mortis, mi volas raporti al vi.

Pli ol dudek junaj talentuloj restadis en Chaux-  
-de-Fonds dum semajno en oktobro 1987 por studi sub  
lia gvido. Fina koncerto okazis en la najbara urbo  
Le Locle en malnova preĝejo, kie multaj lignaĵoj kaŭ-  
zas bonegan akustikon. Mi mem ĉeestis tiun koncerton  
kun mia filino Marion, kiu ludas violonĉelon. Tiam  
dekdujariĝa ŝi ne partoprenis la tutan staĝon sed nur  
parteton por infanoj de la muziklernejo. La koncerto  
estis belega, ni aŭdis antajn kaj ontajn virtuozojn.  
Ĉe la fino, Tortelier formis orkestron el dudekkvar  
violonĉelistoj kaj ĉiuj kune ludis sesvoĉe verkon de  
Tortelier mem, nomatan "Le Grand Drapeau" = "La Granda  
Standardo". Post la ludado, li aludis la fakton, ke  
oni pli bone ĝuas nuntempan muzikon, se oni ĝin plur-

foje aŭdas. La grupo do reludis la tuton. Tortelier ankaŭ diris la frazojn, kiuj akompanas tiun verkon, kaj klarigis, ke gi estas himno por Eŭropo. La enhavo estas proksimume tia: post militema pasinteco ni umriĝu por krei oran estontecon; la vivo kantu, niaj koroj pleniĝu je paco kaj amo! Trian fojon Tortelier direktis la orkestron kaj samtempe kantis per forta voĉo kaj sentebla sindonemo. Emocio sentiĝis ĉe la publiko; aplaŭdo longege daŭris. Dum la ludado mi subite konstatis la samecon inter la teksto de Tortelier kaj la interna ideo de Zamenhof. Estis kiel fulmo en la menso. Tuj mi volis proponi al li traduki la tekston en Esperanton. Ĉar li estis ĉirkaŭigita far pluraj ĵurnalistoj, mi alproksimiĝis al lia edzino por tion proponi. Ŝi reagis tre pozitive kaj promesis sendi al mi la tekston. Mi ricevis ĝin iom poste kun afabla letero de Paul Tortelier. Mi mem ne tradukis la tekston, mi transdonis ĝin kun la muziko kompreneble, al Claude Piron kaj al Nikolin', sed ne nion scias nun pri ĝi.

Inter vi ĉiuj estas certe pluraj, kiuj komprenas la francan kaj povus trovi taŭgan esperantan tekston por tiu vigla melodio. Ĉu iam, komence de iu UK oni aŭdos ĝin kaj kantas ĝin en Esperanto? (Ne facilos trovi 24 violonĉelistojn) Ni devas atenti pri aŭtorrajtoj.

Jen la adreso de la vidvino de Paul Tortelier:

Maud Tortelier  
24 ave. Germaine  
F-06300 Nice

Kiel Tortelier skribis, mi deziras al la tuta mondo dolĉecon, pacon kaj amon.

## LE GRAND DRAPEAU

T R A D U K A D O

Fieres Nations au pasé guerroyant  
notre supreme vietoire est notre union  
Gloire au savant au soldat au prophéte  
qui l'ont scellée de leur sang

Mais pour que s'ouvre la porte d'or de l'avenir:  
Peuples dominos enfin nos orgueils!  
Nos horizons s'éclairent soudain  
augurant de prochains temps de joie.

Frères vibrant d'espoir forgeons nos destins  
armés de courage patients dans l'effort.  
D'un même élan allons brisant toutes nos chaines.  
Laissons sur terre s'épandre la douceur!

Que chante la vie  
Que régnent en nos coeurs  
La Paix et l'Amour...

## T R A D U K - K O N K U R S O

Ni anoncas KONKURSON por plej sukcesa traduko de la teksto (supre) kaj la melodio (sur la sekvanta paĝo) en Esperanton - plej taŭga rilato inter teksto kaj muziko.

Oni aljuĝos tri premiojn - tri-, du- kaj unujaran senpagan abonon de "Muziko".


Limdato: 30-an de septembro 1992.











# Le Grand Drapeau

♩ di Marcia

Paul Tortelier



Martial



1. Ho, Danubo, blua, bela,  
tra verdaj valoj fluadas vi...  
interliganta multajn landojn  
senbrue fluas, fluas, bluas...

Kaj Vieno nun salutas vin,  
kunigas vi nin, kunigas vi nin,  
feliĉaj koroj niaj batas  
ĉe via bela bord'.

2.

Ekde Ŝvarcvaldo vi rapidfluas  
orienten al la maro  
kaj kontemplas vin kaj rigardas vin  
montopintoj kaj kasteloj de l'montar'...

3.

Fejnoj sur la fundo mallaŭte flustras:kion  
vi vidis kaj de kiam la ĉielo bluas super vi.

4. Nun kantu gajan, feliĉegan kanton  
en tiu jubilanta hor'.

Ho, Vieno, mi amas vin,  
estu ĉiam en mia kor'!

5. Danubo, Danubo, vivu vi, vivu vi,  
nia kara, majesta river', rivero kara,  
simbolo, simbolo de l'konkord', de l'konkord'  
gardu nin la fideleco kaj la konkord'!

6. Ho, Danubo, blua, bela, tra verdaj valoj fluadas vi,  
interliganta multajn landojn, senbrue fluas(2)bluas..  
Kaj Vieno nun salutas vin, kunigas vi nin, kunigas nin  
feliĉaj koroj niaj batas por vi, belega...

7. Ĉu vi dormas(2) alloganta nin(2)  
ĉiam, Danubo, bela!

EL "ĈE LA BLUA BELA DANUBO"  
(An der schönen blauen Donau)

Johann Strauss  
Walzer op.314  
Arang.:D.Terziev

No.1  
Valso

S  
A  
T  
B  
blu - a, be - la flu - a - das vi

Ho, Da-nu-bo ----- tra ver-daj va-loj ----- in - ter-li-gan-

mul - tajn lan-dajn ta ----- sen-bru-e flu-as ----- kaj -vi- e -no nun

peco tasesc.

lu - tas vin ----- ku - ni - gas nin fe - li - ĉaj ko - roj ----- ni - aj ----- ku - ni - gas vi nin -----

ba - tas ĉe vi - a be - la bord'. Ek - de Svarc - val - do vi ra -'

pid - flu - as o - ri - on - ten al la ma - ro kaj kon - feh - plas vin kaj ri -'

gar - das vin mon - to - pin - toj kaj ka - ste - loj del' mon - tar'. Ek - de tar'. Fe -'

No.3

100

- i - noj sur la fun - do mal - laŭ - te flus - tras: " Ki - on vi

110

vi - dis kaj de ki - am la ŝi - e - lo blu - as su - per vi." Fe - vi."

No4

Trankvile

Nun kan - tu gaj - ah, fe - li - ce - gan kan - ton en ti - u ju -  
gaj - an kan - ton en ti -

bi - lan - ta hor'. Ho, Vi - e - no, mi a - mas vin  
u hor' a - mas vin

es - tu ŝi - am en mi - a kor'! Nun kan - tu ŝi - am vi  
en mi - a kor'

No5 Pli rapide

es mi - a kor'. Da - nu - bo

Da-nu-bo vi - - - vu vi vi-vu vi ni -

bo Vi-vu vi

a ka - - - ra, ma- je - - - sta ri-ver''

ri - ve - ro, ka - ra

sim - - - bo - - - lo sim - bo-lo del' kon - kord''

sim-bo-lo del' kon-

kord' del'kon-kord'gar - - - du nin la fi- de - le - co kaj la kon-

kord''

No6

blu- a be- la'

Ho, Da - nu - bo - - - - - tra ver-daj va-

flu- a - das vi mul- tajn lan- dojn

loj - - - - - in- ter-li-gan-ta - - - - - sen-bru-e flu-

flu-as blu-as sa-lu-tas Viu  
 as ————— kaj Vi-e-no nun ————— ku-ni-gas vi

ku-ni-gas nin fe-li-ĉaj ko-roj ni-aj ba-tas por vi be-  
 nin

**No?** Malrapide al lo-gan-ta nin  
 le-ga... Cu vi dor-mas al-  
 Cu vi dor-mas

lo-gan-ta, al-lo-gan-ta nin, al-lo-gan-ta  
 lo-gan-ta, al-lo-gan-ta nin, al-lo-gan-ta

Rapide  
 -am Da-nu-bo,  
 -am Da-nu-bo,

be-  
 be-



I N T E R V U O J

Prof.d-ro Stojan Ĝuĝev atingis sian 90-an naskiĝ-jaron. Li estis Prezidanto de Bulgara Esperanta-Asocio, longjara Prezidanto de Muzika Esperanto-Ligo (MEL) kaj Vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto. Okaze de lia jubileo ni faris intervuojn kun li:

**MUZIKO:** Diru, ni petas vin prof.Ĝuĝev, kiam kaj kie vi naskiĝis? Kĉlkajn vortojn pri via familio, via lernado, studado kaj laborado al nia legantaro.

**Prof.ĜUĜEV:** Mi naskiĝis la 19-an de decembro 1902 en urbo Pazarĝik, Bulgario. Mia patro Stojko Stojanov Ĝuĝev estis juĝisto kaj advokato. Mia patrino estis el Makedonio. Ŝi finis gimnazion en Sofio, kaj mortis tre juna-27jara.

Mi finis gimnazion en urbo Panagjuriŝte, poste Konservatorion en Sofio, kiel violonisto ĉe prof. N. Abaĝiev. Unu jaron mi laboris kiel muzik-instruisto. En 1926 mi forveturis al Parizo, Francio, kie mi studis muzikologion en la Sorbono. Tie mi habilitiĝis kaj doktoriĝis. Poste, mi laboris en diversaj revuoj en Parizo.

Reveninte en Bulgarian, unue mi laboris en la Ministerio de la popola klerigo kiel inspektoro pri muziko, kaj poste longjare (50) en Bulgara Muzik-Akademio, kiel profesoro pri muzika folkloro kaj muzik-akustiko.

M: Ekde kiam vi studis Esperanton?

Prof. Ĝ: Jam kiel lernanto en la unua klaso de la gimnazio mi komencis lerni Esperanton aŭtodidakte. Post unujara lernado mi korespondis kun eminentaj bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj (Ivan Kràstanov, prof. Pe-evski k.a.). Dum mia studado en Parizo mi regule frekventis la kunvenojn de la Franca Esperanto-Asocio, prelegis pri Bulgara kulturo kaj amikiĝis kun multaj francaj esperantistoj. Kelkajn jarojn mi estis Prezidanto de Bulgara E.Asocio.

M: Kion vi povus rakonti pri Muzika Esperanto-Ligo?


Prof. Ĝ: MEL estas aktiva muzika-esperantista organizaĵo, kiu ligas muzikistojn kaj muzikamantojn el la tuta mondo. Ĝi celas krei kontaktojn kaj kunlaboron inter diverslandaj esperantistoj-muzikistoj.

M: Kion vi bondezirus al niaj legantoj?

Prof. Ĝ: Sanon kaj aktivan agadon en la Internacia Esperanto-movado.

---

Estimata sinjoro Redaktoro,



Per tiu ĉi mi sciigas al vi, ke mi pagis mian kotizon al MEL-1992, pere de mia konto ĉe UEA.

Mi antaŭĝojas pri venontaj numeroj de MUZIKO, kiun vi tiel bone redaktas.

Samtempe mi kunsendas kopion de muzikaĵoj, kiujn mi hazarde posedas. Mi ne estas kompetenta juĝi, ĉu ili estas interesaj por la esp-istaj muzikamantoj, aŭ ĉu eble ili estas jam delonge bone konataj.

Bondezire,  
Tre kore via

92.01.13

W. Auld



## R A P O R T E R A Ĵ O J

Estis iom da interesaj muzikeroj dum la Aŭstralia-Nov-Zelanda Kongreso, kiu okazis de la 11a ĝis la 19a de januaro ĉe RICHMOND, 60 km okcidente de SYDNEY. Iun vesperon, je la komenco de distraja programo, kantgrupo prezentis du kantojn, "Pac-kanto de Esperanto" (el antaŭa MEL-bulteno) kaj "La Vera Frataro" de Harrison Hill. Ni feliĉe bonvenigis en la kantgrupon vizitanton de Nederlando, Romana de Vries, kiu parto-prenis la tutan Kongreson. Ŝi kaj kelkaj aliaj rapide lernis la kantojn kaj post nur 3 provripetoj kun la Brisbana kantgrupo (kiu jam sciis la kantojn) povis tre plaĉe prezenti la kantojn.

Dum aliaj distraj vesperoj la ĉeestantoj aŭdis sur Roger Springer el Sydney ludi la sakŝalmon; kaj Kam Lee (membro de MEL) tre melodie kantis du kantojn, akompanante sin per gitaro. Lia amiko Alan Turvey provizis harmonion per bekfluto.

Alia vesperon estis formala Kantada Konkurso. Bedaŭrinde, estis nur unu konkursanto, la grupo el Brisbano. La kantistoj ĉarme prezentis 4 kantojn: 1. "Venu man-en-mane" (angle "I'd like to teach the world to sing"), 2. "Tango Romantik" de Ramona van Dalsem, 3. "Fernando" (originale de la popgrupo ABBA), 4. "Mia lando" (originale aŭstralia poemo).

Bankedo okazis dum la lasta vespero de la Kongreso. Je la komenco la ĉeestantoj kantis la du naciajn himnojn "Antaŭen Aŭstrali!" kaj "Nov-Zelandon gardu Di!". Dum la bankedo, honore de niaj Nov-Zelandaĵ-gekuzoj ni kantis iom da Nov-Zelandaĵ kantoj. Je la fino de la bankedo ni kantis:

1 "Kongresa Adiaŭkanto" (melodio de la rusa kanto "Stenka Rasin"; specialajn vortojn verkis Gaye Phillips), 2 "Jen la Horo Nun" (Nov-Zelanda adiaŭa kanto)

Dum la Kongreso estis komunkantado el speciala Kantaro, kompilita por la Kongreso de Gaye Phillips. La Kantaro enhavas 74 kantojn: aŭstraliaj, nov-zelandaĵ, esperantaj, modernaj, popolkantoj.

Mi ne devas forgesi la kontribuon de estimata vizitanto Emile Vokal de Vieno; kvankam li ne kantis, tamen li provizis belan muzikon per kasedoj - orkestra muziko de sia amata Vieno kaj ankaŭ kantoj, kantataj en Esperanto de diversaj eŭropaj kantistoj.

Kay Andersen, BRISBANE, AŬSTRALIO

#### UNUAFOJE EL TIU SALONO..

La 24an de oktobro 1991 en Berlino oni malfermis la jubilean ekspozicion "10jaroj-multaj geamikoj". S-ro Udo Maier, la urba socia koncilisto de Berlin-Charlottenburg salutis en la festsalono 40 esperantistojn kaj 8.100 aliajn partoprenantojn de t.n. Bunta jubilea posttagmezo. Li substrekis la ĉeeston de eksterberlinaj gastoj kaj la mondvastajn kontaktojn de nia Esperanto-grupo, kio praktike pravas la vivecon de Esperanto.

Muzikistoj de nia grupo "Belsono kaj ĝojo", kies pianistino estas nia grupa kasistino, ludis arde internaciajn melodiojn honore al niaj gastoj.

Kafo kaj fruktokuko bongustis kaj ni aŭdis unuafoje el tiu salono ariojn en Esperanto. Kantis s-ino Wiltrud Henning. La dua solisto estis Eugen Gross, kiu kortuŝe kantis "Ho, mia kor'" kaj je la fino -

"Ĉiam amindaj" el "Rigoletto" de Verdi.

Ni aŭdis jubilean poemon fare de s-ino Rose Georg, la aŭtorino de la teatraĵo "Tri bildoj el la vivo de L.L.Zamenhof" (laŭ ideo de H.Moser), kies praprezentado plaĉe finis la abundan programon.

S-ro Fritz Wollenberg, la vicprezidanto de la ELB surbendigis videofilme la tutan teatraĵon.

La festotago finis per komuna vespermanĝo en apuda restoracio. Ni kantis gaje: "Libera la pens'", "Vivu la stel'", "Migrema muelisto", "Ludoviko" (kun solisto Gross) kaj "Ĝis revido en iu gaja hor'".

Hans Moser el Esperantogrupo "Lietzensee"  
Herbartstrasse 25, D-1000 Berlin-19, GERMANIO

R O K' - M U Z I K O
----------------------

Grandan ĝojon alportis al ni "ROK-GAZET'" No3 el Francio.

Tiu revuo, "f r a t o" al nia bulteno "Muziko", belaspektas plenplena de fotoj, ilustraĵoj, intervuoj, recenzoj ....

En la rubriko "Malrok-muziko" troviĝas artikoloj pri Internacia Esperanto-Horo, pri la fama kontratenoro SEAN OSBORNE, pri eks-sovetaj muzik-steloj.

Ni varme proponas tiun interesan revuon al nia legantaro.

Turnu vin al: ESPERANTO ROK-ASOCIO, F-31450  
DONNEVILLE, FRANCIO.

(Vidu paĝon el "Rok-gazet' No3 !)

## Eksterordinara muzika kongreso...

La rekta influo de la partopreno de junaj aktivuloj en la Organiza Kongres-Komitato esprimiĝas per aparta karaktero akcionita al la venonta SAT-Amikara Kongreso (17-21 aprilo 1992 en Bordeaux). Efektive la servoloko rezervita al la gejunuloj estas nekutima: ili estos ĉie !!! Interalie ili zorgos pri la animado de la tuta, tre riĉa, kultura programo.

Ni do povas jam anonci al vi tre aktivan kongreson, kun efektiva partopreno de la ĉeestantoj, kiuj ne enuos, kaj viglan etoson (pluraj samtempaj programeroj ebligas elekton laŭ ĉies gusto !).

Akceptonte vin en la regiono, kie naskiĝis la unuaj trobadoroj\*, ŝajnis evidente, ke ESPERANTO-GIRONDE elektu kiel kongrestemon:

### "De Mozart ĝis Eurokka MUZIKO kaj ESPERANTO Komplikeco de du internaciaj lingvoj"



Kial "De Mozart ĝis Eurokka" ? Ĉar ni ja kantas kaj dancos laŭ ĉiuj ritmoj kaj laŭdire Mozart ja estis la unua rokmuzikisto !!! Jen senvualigita sekreto, ĉu ne ? Tiun temon prikantos ilustritaj prelegoj, kiel ekzemple : "BIOMUZIKO, aŭ la influo de la diversaj muzikistiloj al la menso kaj la korpo" prezentota de Iñaki GAUNA (Eŝkio); ankaŭ "Prezentado de Eurokka" gvidata de nia FLO !

20

17a KONGRESO DE SAT-AMIKARO

BORDEAUX - 072-APRILIO-1992

MUZIKO KAJ ESPERANTO



Saskia VEEN, harpistino, kaj Edward HOEPELMAN, tenoro, ludos klasikemulojn. Pli movplena estos la kabareto kun etaskaj kantoj kaj gaskonaj popoldancoj. Sed la malfermo de nia kongreso al la junaj ĝirondianoj trafos sian zeniton dum la E-roknokto ! Tiam sinsekvis sur la scenejo de la loka kulturcentro : SOLO kaj LA ROZMARIJAJ BEBOJ !!! La petolemajn idojn de la tuluza rokaro oni tie atendas kiel stelgrupon. Loka bando restas kontaktinda por enkonduki la koncerton.

La feliĉaj partoprenantoj de la kongreso estos do invitataj ĝui plej eble multdiversajn stilojn kaj ritmojn.

Nur kiuj tute ne ŝatas muzikon, tiuj rajtas preteksti kapdolorojn por rifuzi nian inviton.

### LEGANTOJ DE ROK-GAZET VENU MULTNOMBRAJ !!!

Petu informojn kaj menuu aligilojn ĉe:  
S. BERNARD, 171 avenue R. Poincaré,  
F-33110 LE BOUSCAT.

(\*la plej malnova konata trobadoro de la francilingvaj teritorioj estas la Duko de Akvitanio VILHELMO la IX<sup>a</sup> -1088-1127)

REAGOOJ

-- Listigi gajnintojn de Belartaj Konkursoj en la branĉo "KANTO" kaj verkojn de Esperantaj komponistoj estas tre bona ideo.

Louise Marin, FRANCIO

-- Mi ĵus tre ĝuante relegis "Muziko"-n 91/2 kaj 91/3 kaj multe miras kaj admiras vian redaktaĵon kaj vian produktaĵon.

Jenny Bishop, BRITIO

-- Kultura kunlaboro

Establos komunan kulturen centron por instrui ĉinan lingvon, ĉinan muzikon, ĉinan kuir-arton, ĉinan tradicion medicinon ktp. Kiu interesiĝas, sendu leteron al: Wang Huai Yu, 9-hao, 17-Li, 2-duan, Guilin-jie, Heping 110002 Shenyang, ĈINIO

-- Mi legis la lastan numeron de "Muziko" kun granda intereso.

D-ro Tazio Carlevaro  
SVISLANDO

-- Unue mi tre kore dankas al vi por MEL. La bulteno estas tre interesa por mi...

Irena Sciubak, POLLANDO

-- Al mi tre plaĉas ĉi tiu bulteno tial, ke estas kantoj kaj diversaj leteroj, kiujn mi tre volonte legas. Mi deziras ricevi "Muziko"-n 92j. Kotizon mi pagos en Vieno.

Ursula Piątek, POLLANDO

1. Esperantista kulturdomo en Razgrad, Bulgario (str. G.Dimitrov EK-3) organizos Esperantistan festivalon kun konkurso pri originala E.-literaturo "EKRA'92" je la 5,6,7a de junio 1992.

En la festivalo povos partopreni kantistoj, kantist-grupoj, instrumentmuzikistoj, dancistoj kaj dancensembloj. La domo akceptos gastiganton sur baze de reciproka gastigado. Dum la festivalo estos organizitaj amuzaj iniciativoj. Kontraŭ \$100 estos organizita pikniko en renesanca vilaĝo kaj tritaga feriado ĉe la Nigra maro.  
Limdato por aliĝo: 25.05.1992

2. La 5-a INTERNACIA MUZIKA SEMINARIO-"PARALELA LINGVA KAJ MUZIKA INSTRUADO-teorie kaj praktike" sub la gvido de prof.Dimităr Terziev o k a z o s de la 26-a de junio ĝis la 5-a de julio 1992 en urbo STARA ZAGORA, BULGARIO.

Interesatoj- muzik-instruistoj, muzikamantoj, kantistoj kaj muzikemaj lingvistoj devas pli rapide (la lokoj estas limigitaj) turni sin por pli detalaj informoj al la organizantoj- MUZIKA ESPERANTO-LIGO (MEL) ul. Milin kamak 58, Sofio 1421, Bulgario.

3. De la 6-a ĝis la 11-a de julio, 1992 en KULTURA CENTRO ESPERANTISTA, La Chau-de-Fonds 2301, Pf.779 okazos interesa aranĝo "RUSE KAJ KORUSE".

Gvidos ĝin la (eks-)sovetia esperantisto Ivan Popov. La enhavo estos varia: pri-esperantaj, do "movadaj kantoj"; popolaj kantoj de diversaj landoj; porinfanaj kaj aliaj belaj kantoj; kompara analizo laŭ diversaj

tradukoj de samaj kantoj. Paralele okazos distraj kaj lingvaj ludoj.

**P R O P O N O J**

D-ro Tazio Carlevaro,  
SVISLANDO

"En la lasta numero de "Muziko" unu afero tuŝis min. Ekzistas muzikpecoj "nekonataj", nenie aperintaj, t.e. neniam publikigitaj. Mi proponas la jenon: eblus transkribi per informadika sistemo (ĉu stori per skanero - "scanner", ĉu transkribi per specialaj programoj, kiujn mi tamen ne konas, ĉar muziko ne apartenas al miaj specialistaj fakoj) la malsamajn en viaj arkivoj troviĝantajn muzikpecojn (kondiĉe ke la aŭtoro konsentas je tio!), kaj ilin "eldoni" laŭpete kaj laŭnecese (laŭ starigota katalogo) eventuale kontraŭ certa (difinita) antaŭpago, kiun oni ĝiru, almenaŭ parte, al la aŭtoro mem. Fakte, eblas ĉiam reprodukti ion storitan en komputilon, ekz-e per lasera printilo.

Mi esperas, ke tiu mia propono elvokos intereson, kaj mi restas je dispono por plua diskuto, kaj por eventuala rekta transpreno de informadika tasko.

**NI KONDOLENCAS**

La 3-an de decembro 1991 subite forpasis MARCELLE TURIN, unu el la fondintoj de la Internacia Esperanto-Ĥoro, MEL-anino kaj FD pri muziko.

La funebra ceremonio okazis en Pontarlier, Francio. Je la nomo de la lokaj amikoj kaj esperantistoj parolis s-ro Coulon el Besançon.

Ni estimplene kliniĝas antaŭ ŝia hela memoro.

La redakcio

Firmao "Pres-Esperanto"

Presejo - str. "Angelov vräh" 23, Sofio 1618

1888-1889 МАНИЕ-1888  
ПОЛНАТ СЕРПЕН КОСА



1888-1889  
ПОЛНАТ СЕРПЕН КОСА  
БЪЛГАРИЯ 67 СТ BULGARIA

Redakcio de "Muziko"  
Milin Kamak 58  
1421 Sofia  
BULGARIO